

Lingvo Internacia



Duonmonata gazeto

por

Esperanto

eliranta la 1-an kaj 15-an de ĉiu monato

~~~~~  
*XI-a Jaro*  
~~~~~

PARIS, V^e
PRESA ESPERANTISTA SOCIETO
33, Rue Lacépède, 33

ONI ABONAS L. I. ĉe:

a) oficejo de la gazeto en **Paris**, — b) S-ro *P. Ahlberg*, Sekretario de Klubo Esperantista, en **Stockholm**, (Svedlando), Döbelnsgatan 50, — c) S-ro *Manuel Benavente*, Sociedad 14, **Murcia**, (Hispanlando), — d) S-ro *K. Ostanievič*, «Kontoro Esperantista», en **S.-Peterburg** (Ruslando) Jaščik 80, — e) Societo «*Espero*» en **S.-Peterburg** (adr. D-ro *A. I. Asnes*, Bolšaja Podjačeskaja, d. 24. kv. 12.), — f) Firmo *Möller & Borel*, Prinzenstrasse 95, **Berlin S.** (Germanlando), — g) Firmo *J. Lindauer'sche Buchhandlung (Schöpping)*, Kaufingerstrasse 29 **München** (Bavarujo). — Oni sendu abonmonon nur al unu el tiuj ĉi sinjoroj resp. firmoj, aŭ al redakcioj de gazetoj aŭ sekretarioj de grupoj esperantistaj.

Jara abono: sen literatura aldono **5 frankoj**, kiun sumon oni sendu laŭeble per poŝta mandato. (Por papermonoj ni kalkulas: 5 frankoj = 2 rubloj = 4 germ. markoj = 4 ŝilingoj = 1 dolaro = 2,50 hol. floreno = 4 skand. kronoj = 5 aŭstro-hungaraj kronoj.) — Kun literatura aldono **7,50 fr.**

Prezo de ĉiu numero 40 centimoj; numero de la Kongreso 60 centimoj.

Pago por anoncoj: 40 centimoj por linio (kompostita el «petit» presliteroj); ĉe pli granda anoncado estas donata rabato laŭ reciproka konsento. Malgrandajn nekomercajn anoncojn ni presas por niaj abonantoj po dudek centimoj por linio. Rabato por almenaŭ ses presoj: 10 %

La ŝanĝo de adreso kostas 50 centimojn.

Poŝtmarkoj estas akceptataj nur por $\frac{3}{4}$ de ilia valoro.



Baldaŭ aĉeteblaj ĉe la **PRESA ESPERANTISTA SOCIETO**

— — **MUZIKVERKOJ** — —

En sonĝo, teksto de *D-ro Zamenhof*, muziko de *Josée Guivy*,
1 fr. 60 c.

Himno, teksto de *Profesoro Dombrowski*, muziko de *Josée Guivy*, 1 fr. 50.

ADELBODEN -- Svisujo

1400 m. s. m. — **BERNA OBERLANDO**

somera kaj vintra kuracada stacio

Internacia Apoteko -- Th. Hopf

donas informojn esperante, germane, france, angle.

Beletaj promenadoj, centro por Alpaĵ iradoj. La plej belaj kampoj por ekskursoj kaj ĉiuj vintraj sportoj. Plej suna kaj protekta situacio. Multaj komfortaj hoteloj.

Por ceteraj informoj pri Oberland Berna, sin turni al
S-ro **Oscar Hopf**, eldonisto, en **Thun (Svisujo)**

HELSINGFORS, Finlando, *Martin & Mäkelä*, librejo (adr. : It. Wiertotie 6, Felef, 5434, rekomendas sin al la finlandaj Esperantistoj.

Lingvo Internacia

Duonmonata organo en Esperanto

Redakcio kaj administracio : PARIS, 5-e Arr., 33, rue Lacépède, 33

15 majo 1906

S. Meyer : La Rochelle.	273
François Coppée : Pereinta en maro (trad. GRUPO ESP. EN MONTPELLIER).	279
E. Pargaetzi : Rememoro (<i>originala versaĵo</i>) .	283
Oscar Wilde : La najtingalo kaj la rozo (trad. OTTO SIMON).	284
Paul Champion : Terkultura kalendaro (majo).	290
Avizo al Akciuloj de la Presa Esperantista Societo.	294

Tra la mondo Esperantista :

Movado Esperantista	295
Bibliografio	299

Nia aldono literatura (paĝoj 145-160) : **Rab kaj ĝiaj amikoj**, de D-ro CHRISTEN (*fino*) kaj **La Festo de la Renaskiĝo**, de V. DOROŜEVIĈ (Trad. I. SIRJAEV), *komenco*.

LA ROCHELLE

La Rochelle (La Roŝel) estas urbo tre malnova.

Por konvinkiĝi pri tio ĉi, sufiĉas ekrigardi ĝiajn antikvajn turojn, ĝiajn arkadojn kaj la malnovajn domojn, kiuj vidiĝas ankoraŭ en kelkaj stratoj. Koncerne ĝian ĝustan aĝon, malpli facile estas ĝin scii.

Ŝajnas, ke La Rochelle estis unue simpla aro da dometoj konstruitaj de kelkaj malriĉaj fiŝkaptistoj. Pro tio ĝi ne estis rimarkita de la malnovaj historiskribistoj.

Por sia loĝado tiuj fiŝistoj devis elekti naturan golfeton, kie iliaj barkoj povos rifuĝi facile dum la ventegoj. Ilia rifuĝejo ne estis ĝuste en la loko, kie la nuna haveno kuŝas. La malnova haveno konsistis en simpla kanalo, kies enirejo estis proksime de la nuna « Lanterna » turo, kaj sekvis ĉirkaŭe la direkton

de la nuna deŭfluilò laŭlonge de la remparò ĝis la granda placo (*Place d'Armes*).

La unuaj domoj de La Rochelle konstruiĝis sur mallarĝa peco de tero ĉirkaŭ tiu natura haveno. Kredeble tiu peco de tero farita el ŝtonega altaĵo estis unue nomita *Rochelle*, t. e. malgranda ŝtonego, kaj tiu nomo estis poste donata ankaŭ al la naskiĝanta urbeto.

Iom post iom la malnova haveno pleniĝis per la sablo kaj la ŝtonetoj enŝovitaj senĉese de la ĉiutagaj alfluoj de l'maro; oni devis do forlasi ĝin kaj ekuzi la nunan havenon.

Tiu ĉi ankaŭ estis en la komenco nur malgranda golfetokavigita de l'maro. Pligrandiĝante, la urbeto sin etendis sur tiu flanko.

La ĉefa urbo de la regiono estis tiam *Châtel-Aillon*, granda kaj fortika urbo, ĉirkaŭata de remparoj, turoj kaj profundaj enfosaĵoj. Ĝi estis Sinjorlando dependanta senpere de l'Reĝo.

En la komenco de la dekdua centjaro Vilhelmo deka, Duko de *Aquitaine* kaj Grafo de *Poitou*, atakis Isambert' on, Sinjoron de *Châtel-Aillon*, kaj venkinte lin, duone detruis lian urbon. La ondoj maraj, senĉese mordetante la bordon, iom post iom pleniĝis ĝian ruiniĝon, kiel ili ankaŭ estis ruinigintaj alian urbon, *Monmeillan*, kiu staris iom pli okcidente, proksime de la nuna insulo *Aix*.

Post la malapero de tiuj du urboj, iliaj loĝantoj rifuĝis en La Rochelle'on kiu, de tiu momento, pligrandiĝis rapide.

La urbo ĉirkaŭiĝis per fortikaj muregoj kaj enfosaĵoj.

Multaj domoj kaj preĝejoj estis konstruitaj en la jaro 1152^a kaj en la sekvantaj.

Ŝtona ponto faciligis la komunikon kun la kvartalo *S. Nokolaso* tiam disigita de la urbo per la akvoj fluantaj el *Périgny*.

Vilhelmo deka, post la detruo de *Châtel-Aillon*, elektis La Rochelle'on kiel ĉefurbon de *Aunis* kaj donacis al ĝiaj loĝantoj plenan liberecon.

Je l'morto de Vilhelmo, la Duklando *Aquitaine* kaj ankaŭ La Rochelle, fariĝis proprajo de lia filino Eleonore edzino de l'Franca reĝido. Tiu ĉi baldaŭ fariĝis reĝo sub la nomo Ludoviko sepa de Francujo kaj tiel La Rochelle estis kunigita kun la Franca reĝa regno.

Tio ĉi ne daŭris longe. Ĉar en la jaro 1252^a Eleonoro

eksedzinigita de Ludoviko sepa reedzinigis kun Henriko de Normandujo, kiu fariĝis Henriko dua de Anglujo. Tiam La Rochelle kaj la tuta Duklando *Aquitaine* transiris sub la regadon Anglan.

Henriko penadis gajni la korojn de la Roŝelanoj, donante al ili multajn privilegiojn.

En la 1224^a jaro, la franca reĝo Ludoviko oka reprenis La Rochelle'on de la Angloj; en la 1360^a, ĝi denove estis transdonita al Anglujo per la traktato en *Brétigny*, kaj ree fariĝis franca post 12 jaroj.

Tiuj multaj ŝanĝoj de posedantoj ne malhelpis La Rochelle'on prosperi kaj kreski komerce kaj milite. Malmulte ŝanĝiĝis ĝia interna vivo.

La urbo estis regata de cent *Pairs*. Kiam oni devis elekti urbestron, tiuj cent *Pairs* proponis 3 eminentajn burĝojn, kaj el tiuj ĉi tri la reĝo devis elekti unu. Li havis nur du tagojn kiel limtempo, kaj li devis tuj konigi sian decidon kaj la nomon de l'nova urbestro, kiu estis elektita por unu jaro.

Por helpi al la urbestro en la administrado de l'urbaj aferoj, 24 el la *Pairs* elektiĝis ĉiujare (12 *échevins* kaj 12 konsilantoj).

De l'Francuja reĝo estis elektataj unu delegato civila kaj juĝista, kiu tamen prezidis nur juĝistarojn roŝelanajn, kaj unu reganto milita, kiu nenion povis ordoni al la urba militistaro sen la konsento de l'urbestro kaj de la *Echevins*.

Pro tiaj gravaj privilegioj, La Rochelle estis kvazaŭ vera respubliko, tiel sendependa de l'reĝo, kiel la grandaj Duklandoj.

Antaŭ ol eniri en la urbon, la reĝo devis ĵuri, ke li respektos ĝian liberecon. Nur post tio la urbestro tranĉis la silkan ŝnureton streĉitan antaŭ la pordego.

Malgraŭ tio, La Rochelle montris sin tre fidela vasalo de l'Francuja reĝo kaj lin helpis forte en liaj militoj kontraŭ la Angloj.

En la dek-sesa jarcento komenciĝis la interreligiaj militoj.

La Rochelle fariĝinta la rifuĝejo de la Protestantoj, sufiris du gravajn sieĝojn de l'reĝa soldataro.

La unua okazis en la 1573^a jaro.

Ĉe tri flankoj ŝirmata de l'maro kaj de marĉoj, la urbo povis nur esti atakata ĉe la norda flanko.

La tiama urbestro Jacques Henri fortikigis ĉiamaniere la urbon kaj disdonis armilojn al ĉiuj urbanoj.

Inter la sieĝatoj troviĝis eminentaj oficiroj, antaŭe fidelaj regatoj de l'reĝo, sed devigitaj pro sia religio batali kontraŭ la reĝaj katolikaj militistoj. De l'tuta Francujo (Paris, Orléans, Tours, Bordeaux, Castres, Nîmes, k. a.) alkuris kalvinistoj savintaj sin el la mortigado farita dum la *Sankt' Bartelemea*, nokto kaj ĉiu el ili estis preta oferi sian vivon. De tiu momento la Protestantoj fariĝis partio tiel politika, kiel religia.

Tiu unua sieĝo malsukcesis kaj la reĝaj militistoj devis foriri post kvar monatoj, perdinte ĉirkaŭe 22.000 soldatojn, dum la sieĝatoj perdis 1300 homojn, tio estas, ĉe ambaŭ flankoj, la duono de la militantoj.

La paco fariĝis kaj daŭris ĝis 1627, kiam Richelieu aperis antaŭ La Rochelle, decidinte al militi ĝin. Li ne uzis la samantaktikon ne sukcesintan al la unuaj sieĝantoj, kiuj eluzis siajn fortojn per ok sangaj atakegoj.

Li zorge ĉirkaŭis la urbon per enfosaĵo larĝa je 12 futoj, profunda je 6 futoj kaj longa je 3 mejloj. Post tiu ĉi enfosaĵo konstruiĝis rempareto kun 17 fortikaĵoj kaj multaj redutoj, armitaj per fortaj paflegoj. 40.000 soldatoj, komandataj de la plej lertaj generaloj de l'regno, loĝadis sub tendaroj ekster tiuj konstruaĵoj kaj ricevis la ordonon neniam ekbatali, escepte se la sieĝantoj provos eliri.

Trankvila pri la tera flanko, Richelieu okupis sin pri la mara; ĉar malgraŭ la pafado de l'reĝaj fortikaĵoj la Roŝelanaj ŝipoj ofte preteriris dum la nokto kaj ankaŭ la Angloj povis pasi kaj alporti helpon kaj nutraĵon al la sieĝatoj.

Richelieu entreprenis fermi ankaŭ tiun trairejon. Li denpikigis palisegojn, subakvigis ŝipojn ŝarĝitajn per ŝtonoj kaj sur tiu fundamento konstruigis altan kaj fortikan digon, nur malfermitan en la mezo per trairejo apenaŭ larĝa je kelkaj metroj kaj defendata per du aliaj digetoj, provizitaj je paflegoj, kaj du fortikaĵoj. Traboj kunligitaj per feraj ringoj baris tiun irejon, kaj triobla vico da militŝipoj staris tie, ĉiam pretaj por la batalo.

Tiel farinte, Richelieu paciencie atendis la senduban rezultaton.

La sieĝatoj nepre izolitaj baldaŭ konsumis ĉiujn provizaĵojn kaj la malsatado komenciĝis.

La detaloj rakontitaj de la tiamaj historiskribintoj estas teruraj. Manginte la plej naŭzajn bestojn, provinte anstataŭi la tritikon per pistitaj ostoj kaj ligno, la viandon per ledoj kaj pergameno, la Roŝelanoj eĉ englutis ĝipson kaj ardezon pistitan. Multaj mangis mortintajn homojn; virino vidiĝis manganta sian propran brakon. La homoj ankoraŭ vivantaj, kun haŭto nigra, preskaŭ traborita de la ostoj, sentis netolereblan doloron je la plej malforta tuŝeto.

Kiam, post 14 1/2 monatoj da sieĝado, la Roŝelanoj devis kapitulaci kaj reĝo Ludoviko dek-tria eniris en la urbon, li ne povis deteni siajn larmojn je l'vido de tiaj suferoj.

La heroa kontraŭbatalo de la sieĝatoj en tre granda parto estis ŝuldata al merito de ilia urbestro, la brava Jean Guiton, kiu montris sin admirinda en ĉiuj okazoj, ĉiam bonhumora, ĉiam kvieta, preskaŭ ĝaja, kaj ĉiam laboranta. Tage li prezidis la konsiliĝojn, vizitis la malsanulojn, konsolis la mortantojn; nokte li ordonis aŭ kondukis mem patrolojn.

Kiam la kontraŭstaro fariĝis tute neebla, Jean Guiton, devigita cedi, elirigis el malliberejo sian privatan malamikon Collin kaj transigis al li la gardon de l'urbo, en la espero ke tiu ĉi ricevos pli bonajn kondiĉojn por la kapitulaco.

La kondiĉoj tamen estis tre severaj. La Roŝelanoj konservis vivon kaj proprajn, sed ĉiuj privilegioj de l'urbo estis nuligataj kaj la remparoj detruataj. (Ili poste estis rekonstruitaj de Vauban).

La urbestro kaj dek el la plej eminentaj burĝoj estis ekzilitaj. Ili revenis poste kaj Jean Guiton mortis en La Rochelle, kie lia nomo ankoraŭ estas tre honorata. Oni montras en la urba palaco la marmoran tablon, kiun li frapis per sia ponardo ĵurante, ke li kontraŭbatalos ĝis la fino.

Post tiu kapitulaco la politika rolo de La Rochelle estas finita.

La urbo konservas vidiĝon apartan kun siaj arkadoj kaj siaj antikvaj turoj, sed ĝia loĝantaro tute aliĝis. Apenaŭ kelkaj el la nunaj familioj roŝelanaj devenas de la tiamaj loĝantoj.

La ĉefaj monumentoj de La Rochelle estas la sekvantaj:

Turo *Saint-Nicolas* (XII^a, XIV^a, kaj XVI^a jarcentoj), Turo *de la Chaines* (XV^a jarcento), Turo *de la Lanterne* (XV^a jarcento), *Grosse Horloge* (XIII^a, XIV^a, XV^a, XVII^a, kaj XVIII^a jarcentoj). Urba palaco (*Hôtel de Ville*) (XVII^a jar-

cento). Borso (*Bourse*) (XVIII^a jarcento). Preĝejo katedra (*Cathédrale*) (XVIII^a jaro cent). Domo de *Diane de Poitiers* (XVI^a jarcento).

Industrio kaj Komercio. — La Rochelle estis iam unu el la ĉefaj Francaj urboj per la industrio, komercio kaj marveturado. Tie troviĝis fajenco-kaj vitro-fabrikoj, sukerrafinejoj k. a.

Poste sekvis en la lasta centjaro intertempo de malprospero kaŭzita de la perdo de Kanado de la insulo Sankt'Domingo kaj de aliaj kolonioj, kun kiuj la Roŝelanoj faris tre aktivan kaj profitan komercadon.

Oni devis do konformigi sin al la novaj kondiĉoj trudataj de la cirkonstancoj. En la lastaj jaroj konstruiĝis la belega haveno de La Pallice, je kvar kilometroj de La Rochelle. Tiu ĉi haveno, kun doko larĝa kaj profunda, povas ricevi eĉ la plej grandajn ŝipojn.

Apud la nova haveno baldaŭ konstruiĝis petrolrafinejo ŝpinejo, kaj kelkaj fabrikoj de gelateno kaj de ĥemiaj produktaĵoj.

Tiuj ĉi fabrikoj siaparte altiras multajn ŝipojn ŝargitajn per karbo, mineraloj, ostoj, kruda petrolo, kaj kanabo, ne malhelpante la komercon de la malnova haveno, kiu ankoraŭ kiel antaŭe ricevas la malpli grandajn ŝipojn kun karbo, ligno k. t. p. kaj la multegajn barkojn de fiŝkaptistoj.

Ĉar la fiŝvendado estas ankoraŭ unu el la ĉefaj komercaj fakoj de La Rochelle ĉiutage multegaj korboj da fiŝoj ekspediĝas al Parizo, Anglujo, Germanujo, Hispanujo kaj eĉ al apudmaraj urboj de Italujo.

Ostroj, konkoj, salo mara, vino kaj brando, kalko kaj cemento ankaŭ estas komercaĵoj de la roŝela vendaĵaro.

Laŭ la lastaj kalkuloj oficialaj, La Rochelle enhavas nun denove 28.000 loĝantojn, tio estas ĉirkaŭe la saman nombron, kiel en la epoko de sia plej granda prospereco, antaŭ la sieĝo de la 1627^a jaro.

S. MEYER.

PEREINTA EN MARO

I

Antaŭ kelkaj jaroj mi restadis iom da semajnoj en mara vilaĝo de la bordmaro Britana. Vera enuejo, sed tamen pentrinda ! Malbona rifuĝejo por dek boatoj pleje ; nur unu strato krutega simila je la fluejo de torento, kaj, tie supre, sur la unua krutebenajo, la preĝejo, juvelo gotika, meze de la tombejo, plena de senfrukta aveno, el kie oni supervidas oceanon.

Sentante, ke mi estas bone lokita por verki, mi restadis en tiu angulo ĝis fino de septembro, kiu — okazo sufiĉe malofta en la multpluva Finistero — estis tiun ĉi jaron eksterordinare dolĉa kaj hela. Mi loĝadis en la tiea sola gastejo grandan ĉambbron, blankigitan per kalko, simple sed pure meblitan, kies fenestro rigardis la maron. Sidante sur pajla seĝo, antaŭ blankligna tablo, mi verkadis tiam tutan poemon, je la bruo solena kaj lulanta de la grandaj ondoj, kiuj ŝajnis diri senĉese al mi, ke la ritmo estas leĝo de la naturo.

Sed oni ne povas fari ĉiam versojn kaj skribi : piedira promeno estis mia higienajo kaj amuzo. Plej ofte mi iradis laŭlonge de marbordo, havante dekstre krutajon nudan kaj monumentŝajnan kaj maldekstre vastaĵojn malkovritajn de la marforiro, senmezuran dezerton sablan makulitan nur de kelkaj aroj da nigraj ŝtonegoj.

La soleco estis absoluta. Apenaŭ mi tie interŝanĝis du-aŭtri-toje saluton kun ia randgardisto, deĵoranta kun pafilo sur la ŝultro. Mi estis tiei regula, tiel pacema promenulo, ke la maraj hirundoj ne timis plu mian ruĝan trikveston kaj saltetadis je kelkaj paŝoj antaŭ mi, presante siajn stelformajn paŝojn sur la malsekan sablon.

Mi tiel faris, ĉiutage, ses aŭ ok kilometrojn, kaj mi revenis hejmen, havante poŝon plenan de tiuj delikataj konketoj, kiujn oni trovas, manfosante la malgrandajn marŝtonaĵojn ĉiam malsekajn.

Tia estis mia ekskurso plej amata. Tamen dum la ventegaj kaj grandfluaĵaj tagoj, mi ellasis la marrandon kaj suprenirante la straton de la vilaĝo, vaĝetis tra la kamparo aŭ sidadis kun

ibro en la tombejo, kie oni estas ŝirmata kontraŭ la okcidenta vento per la maso de la preĝejo.

Kia bela, malgaja kaj reviga loko! Al la aŭtuna ĉielo, kie kuradis la nuboj, la puntsimila sonorilejo staris pia kaj gracia. Korvoj, tie farintaj neston, eliris kaj alflugis blekante, kaj la ombroj de iliaj grandajflugiloj senĉese glitadis sur la tomboj diskúŝantaj en altaj herboj.

Inter du el la murapogiloj preĝejaj duone ruinigintaj, kaj kies ŝtonaĵon grizan kaj morditan de la mara vento ornamis tremetanta bukedo da malgrandaj flavaj floroj, kaprino nigra, ligita ĉe fosto kaj preskaŭ terura pro siaj flamokuloj kaj sia barbeto Satana, blekis kaj tiradis sian ŝnuron.

Vespeŝe precipe, kiam tra la skeleto de maljuna pomarbo mortinta, malglatbranĉa, oni vidadis ĉe la horizonto la sunon sangadantan sur la maro, tiu sovaĝa tombejo plenigis la animon per premanta melankolio. Dum unu el tiuj ĉi vesperoj, vagante inter la tomboj — kelke da ili, sub marista nomo, montris la skribaĵon funebran « pereinta en maro » — mi legis sur kruco ankoraŭ nova tiujn vortojn, kiuj mirigis kaj kortuŝis min :

Tie ĉi ripozas
NONA LE MAGUET

Pereinta en maro la 3an de Oktobro 1878, dek-naŭjara.

Pereinta en maro! Junulino! La virinoj tamen neniam ensipiĝas sur fiŝkaptaj barkoj. Kiel tiu malfeliĉo okazis?

— Nu, Sinjoro, diris subite post mi, voĉo maldolĉa, vi do rigardas la tombon de la malfeliĉa Nona? Min returninte, mi rekonis maljunan mariston, kun ligna kruro, kies amikecon mi allogis per kelkaj glasoj da brando donacitaj en la malalta ĉambro de la gastejo.

— Jes, respondis mi. Sed mi kredis, ke vi, fiŝkaptistoj, ne akceptas virinojn ŝipen. Kaj mi eĉ lasis diri, ke tio okazigas malfeliĉon.

— Kaj tio estas vero, daŭrigis la maljunulo. Efektive Nona neniam eniris ŝipen. Ĉu vi volas scii, kiel ŝi pereis, la karulineto! Mi tuj rakontos tion al vi.

II

« Estas necese diri al vi unue, ke ŝia patro Petro le Ma-

guet estis maristo kiel mi, maljuna kamarado. En la batalo ĉe Le Bourget, kiam admiralo La Roncière metis sian orumitan ĉapeton sur la pinton de sia glavo kaj nin ĵetis antaŭen hakilo en la pugno kontraŭ la domoj fortikigitaj, ni iradis flanko je flanko, Petro kaj mi, kaj li ricevis min en siajn brakojn kiam tiuj malbenitaj prusoj pafis kuglon en mian femuron.

« La saman vesperon, en la vundkuracejo de la fortikaĵo, Petro tenadis mian manon por kuraĝigi min dum la milita kuracisto tranĉetadis min kaj li ankoraŭ ĉeestis, mia bona Petro, kiam la admiralo alportis mian medalon.

« Sed fine tiuj sentaŭguloj prusoj nin superas. Oni subskribas la pacon kaj oni resendas nin hejmen. Kun mia ligna kruro mi povis nur ĝui mian eksmilitan pagon, kiel maljuna besto.

« Sed Petro, kiu havis ĉiujn siajn membrojn, varbiĝis en ŝipistaron fiŝkaptistan.

« Tuj poste, lia edzino mortis pro malvarmumego kaj lasis lin tute sola kun tiu Nonjo, kiu iĝis dek-jara. Kompreneble dum la vidvo estis sur la maro, mi, lia kunulo, mi fraŭlozorgis pri la malgrandulino.

« Bona kaj ĝentila knabino, Sinjoro, tre kuraĝa kaj tre dolĉa. Kiel ofte ni iris duope sur la ŝtonegaĵon, dum marforfluo, por kolekti krabojn, markankretojn, kelkafoje omaron l. Ha ! ni estis paro da amikoj.

« Tio estis bone dum du jaroj. Nona komuniĝis, pligrandiĝis, kreskis kiel sabla kardo. Sed jen en malbonvetera tago, dum la « Amelio » la barko en kiu estis Le Maguet, malfacile sin direktis al la rifuĝejo, jen la ŝipestro malsuprenigas neĝustatempe sian velon kaj ŝipo kaj ŝipanoj iras kaj pereas sur tiun rifon, kiun vi vidas tien..... vidu, iom pli dekstren.

« Estis kvar ŝipanoj la estro, du maristoj inter kiuj mia malfeliĉa Petro, kaj la knabo. Sed la maro volis rekonduki nur tri dronintajn al la bordo kaj konservis mian kunulon.

« Post kiam Nona iĝis orfa, mi kiel eble plej bone klopodis por anstataŭi ŝian patron, mi ne bezonas tion diri. Sed la knabino, eĉ post la granda bato de doloro, ne povis konsoliĝi.

« Ĉu vi scias precipe kial, Sinjoro ! Pro ideo, kiun havas ĉiuj ĉi-tieaj virinoj : ili imagas, ke por ne restadi « dolora animo » ĝis la tago de la Granda Juĝo, oni devas ripozi en sanktigita tero. Ni ne kredas ĉiujn tiujn sentaŭgaĵojn, ni kiuj

scias, kiel oni agas, kiam mortas iu en ŝipo. La ceremonion mi konas: la senviva korpo en sako gudrigita, kun kuglego je la piedo, sur tabulo, apud la ŝiprando; kaj la ŝipestro kun kapo nuda, kun la libro en la mano, legante laŭte la preĝaron por la mortintoj. Sed la virinoj de nia lando tute apartenas al Dio, vi bone scias, kaj Nona komencis bruligi kandelegojn en ĉiuj religiaj kunvenoj por la trankviligo de l'animo de sia patro.

« Tamen la tempo, malgraŭ ĉio, estas bonega vendisto de forgeso, kaj Nona, post kelkaj jaroj, ŝajnis al mi iom konsoliganta. Cetere, la doloro ne malhelpis ŝin fortikiĝi kaj plibeligi; kaj mi ne diras tion ĉi, tial ke mi amis ŝin kiel patro, sed, je mia honoro! ŝi estis la plej beleta junulino en la paroĥo!

« Ni vivadis tiel feliĉe ambaŭ! Oni ne estis riĉa, certe, sed bah oni vivadis malgraŭ ĉio! Mi havas mian eksmaristan pagon, mian ordenan medalon, kaj plie ni ĉiam iris, Nona kaj mi, kapti omĉarojn inter la ŝtonegoj. La metio ne estas malbona kaj nur estas unu danĝero, esti surprizata de l'alfluanta maro... Ha! kia malbona okazo! Tiel ŝi pereis, la malfeliĉulino!

« Unutage, kiam mia reŭmatismo tenis min hejme, kva-zaŭ najle, kiam ŝi foriris sola fiŝkapti dum tago kiel la hodiaŭa kun bela ĉielo kaj granda vento jen ŝtonesploristoj, revenante kun siaj korboj plenaj, rimarkas, ke Nona ne kunestas. Nenia ebla dubo, bona Dio! Ŝi malrapidis, estis ĉirkaŭita de la fluo, ŝi pereis en maro. Ha! kian nokton mi travivis, Sinjoro! Je mia aĝo, jes, maljuna hardulo kiel mi! Mi ploregis kiel virineto! Kaj la memoro al mi revenis tiam pri la kredaĵo de la malfeliĉulino, ke por eniri la ĉielon, estas necese enteriĝi en la tombejon... tial... tuj kiam ekforfluis la maro, mi trenis min al la marrando kune kun la aliaj, serĉadante la korpon. Kaj ni ŝin retrovis, mian Nona'n, daŭrigis la maljuna maristo, kies voĉo malklarigis. Mi ŝin retrovis sur ŝtonego kovrita je fuko, kie, vidante sian pereon, la dolĉa etulino pretigis sin por morti. Jes Sinjoro, ŝi kunligis siajn jupojn per sia koltuko sub la genuoj, pro hontemo, kaj konservante ĉiam sian malnovan ideon, ŝi ligis sin al la herboj per siaj haroj, per siaj belaj nigraj haroj, certa ke oni retrovos kaj enmetos ŝin en sanktigitan teron... Kaj mi povas tion ĉi diri, mi, kiu konas la kuraĝecon: eble neniu viro estus tiel kuraĝa por same fari! »

III

La maljunulo eksilentis. Je la lasta lumo de la vespera krepusko, mi vidis du grandajn larmojn, kiuj fluas sur liaj harditaj vangoj. Ni malsupreniris ambaŭ al la vilaĝo, flanko ĉe flanko, nenion dirante.

Mi profunde estis kortuŝita de la kuraĝo de tiu simplanima knabino kiu, ĝis la terurego de la morto, estis konservinta hontemon de sia sekso kaj piecon de sia raso. Kaj antaŭ mi, en la senlima profundaĵo, en la malhelaj dezertaĵoj de la ĉielo kaj de la maro, eklumiĝis la lumturoj kaj la steloj.

Ho ! kuraĝaj uloj de la maro ! Ho nobla Britanujo !!

EL FRANÇOIS COPPÉE

Tradukis la « Montpelliera Esperantista Grupo. »

REMEMORO

En mirinda maja songo
Vidis mi rozeton flori,
Aŭdis el la montvilaĝo
Sonorilon eksonori.

Ĝojan kanton do mi kantis
De la bela vesperhoru,
Kaj la suno mallevigis
Kiel flua ruĝa oro.

Bela estis la printempo,
Ĝojoplena mia brusto,
Dolĉe blovis la bloveto
Tra solena noktkvieto.

Nun hodiaŭ mi memoras
Al la bela maja horo, —
Sed la brusto nune estas
Ne plu ĝoja, — nek la koro, —

Ĉar hodiaŭ flokoj falas,
Forflugetis nun la gajo. —
Kiam ci al mi revenos
Kara, bela, dolĉa majo ? —

Originale verkita de E. PARGAETZI

La Najtingalo kaj la Rozo

Ŝi diris, ke ŝi dancus kun mi, se mi alportus al ŝi ruĝan rozon, diris la juna studento: — sed en mia tuta ĝardeno estas nenian ruĝa rozo!

La najtingalo en sia nesto sur kverko aŭdis lin; ĝi rigardetis tra la foliaro kaj tre miris.

— Nenan ruĝan rozon en mia tuta ĝardeno — li ripetis, kaj liaj belaj okuloj pleniĝis de larmoj. — Ho! al kiaj malgrandaĵoj ligiĝas la feliĉo! Ĉion mi legis, kion saĝuloj skribis, ĉiuj sekretoj de la filozofio al mi malkaŝaj estas, kaj pro unu ruĝa rozo mia viĝo estas malfeliĉa kaj mizera!

— Fine jen fidela amanto, — pensis la najtingalo. Nokto post nokto mi kantis pri li, kvankam lin ne koninte; nokto post nokto mi rakontis lian historion al la steloj, kaj nun mi lin vidas. Liaj haroj estas mallumaj, kiel la hiacinto kaj lia buŝo estas ruĝa, kiel la rozo de lia sopirego; sed pasio paligis lian vizagon ebure, kaj la ĉagreno premis sian stampaĵon sur lian frunton.

— La princo aranĝos morgaŭ nokte balon, — murmuretis la juna studento; — kaj mia adoratino ĉeestos. Se mi alportos al ŝi ruĝan rozon, ŝi dancos kun mi ĝis mateno. Se mi alportos la ruĝan rozon, ŝi apogos sian kapon sur mian ŝultron kaj ŝia mano kuŝos en la mia. Sed en mia ĝardeno ne estas ruĝa rozo, tial mi sole sidados kaj ŝi pretiros. Min ŝi ne atentos kaj mia koro rompiĝos!

— Efektive, jen la fidela amanto, — diris la najtingalo. — Kion mi kantas, pro tio li suferas; kio al mi estas ĝojo, tio al li estas doloro. Vere, la amo estas io mirinda. Ĝi pli valoras ol smeraldoj, ĝi superas graciajn opalojn. Per perloj kaj granatoj ĝi ne estas aĉetebla; en bazaro ĝi ne marĉandiĝas; Ĝi ne estas komercaĵo por komercisto, kaj sur pezilo eĉ oro ĝin ne ekvilibras.

— La muzikantoj sidos sur galerio, — diris la juna studento; — kaj ili ludos sur siaj kordinstrumentoj, kaj mia adoratino dancos je la sonoro de la harpo kaj de la violono. Tiel malpeze ŝi dancos, ke ŝiaj piedoj apenaŭ tuŝos la plankon, kaj la korteganoj en multkoloraj vestaĵoj amasiĝos ĉirkaŭ ŝi. Sed kun mi ŝi ne dancos, ĉar mi havas nenian ruĝan rozon por ŝi.

— Kaj li ĵetis sin sur la herbon, kaŝis sian vizaĝon inter siajn manojn, kaj ploregis.

— Kial li ploras? — demandis malgranda verda lacerto, preterkurante al li kun sia vosteto en aero. — Jes kial? — demandis papilio flirtanta en sunradio.

— Li ploras pro ruĝa rozo, — diris la najtingalo.

— Pro ruĝa rozo! — ekkriis ĉiuj, — kiel ridinda! — Kaj la malgranda lacerto, kvazaŭ cinikulo, ridegis laŭte.

Sed la najtingalo komprenis la ĉagrenon de la studento kaj silente ĝi sidis en la kverko kaj pripensis la sekreton de la amo. Subite ĝi etendis laflugilojn kaj ekflugis. Kiel ombro ĝi flugis tra la arbareto, kaj kiel ombro ĝi flugis sur la ĝardenon.

Meze sur la bedo staris admirinda rozujo, kaj ĝin vidante, ĝi alflugis kaj sidiĝis sur branĉeto.

— Donu al mi ruĝan rozon, — ĝi ekkriis — kaj pro tio mi al vi kantos mian plej dolĉan kanton.

Sed la arbeto skuis sian kapon.

— Miaj rozoj estas blankaj, — ĝi respondis; — tiel blankaj kiel la ŝaumo de la maro kaj pli blankaj ol la neĝo sur la montoj. Sed iru al mia frato, kiu volve rampas ĉirkaŭ la malnova sunhorloĝo; ĝi eble al vi donos tion, kion vi petas.

Tial la najtingalo flugis al la rozujo apud la malnova sunhorloĝo.

— Donu al mi unu ruĝan rozon, — ĝi kriis. Kaj mi pro tio kantos al vi mian plej dolĉan kanton.

Sed la arbeto skuis sian kapon.

— Miaj rozoj estas flavaj, — li respondis, — tiel flavaj, kiel la haroj de la sireno sidanta sur sukcentrono, kaj pli flavaj ol la flava narciso floranta sur la herbejo antaŭ la alveno de la falĉisto. Sed iru al mia frato, kiu floras sub la fenestro de la studento: eble ĝi al vi donos tion, kion vi deziras.

Tial la najtingalo flugis al la rozujo sub la fenestro de la studento.

— Donu al mi unu ruĝan rozon, — ĝi kriis — kaj mi pro tio al vi kantos mian plej dolĉan kanton.

Sed la arbeto skuis la kapon.

— Miaj rozoj estas ruĝaj, — ĝi respondis — tiel ruĝaj, kiel la piedoj de la kolombo, kaj pli ruĝaj ol la koralventumiloj, ventumantajen la margroto. Sed la vintro rigidigis miajn vejnojn, la frosto tramordis miajn burĝonojn kaj la ventego romp

miajn branĉetojn; kaj tial mi tiun tutan jaron havas nenian rozon.

— Nur unu, unu solan rozon mi bezonas, — kriis la najtingalo, — nur unu ruĝan rozon! Ĉu neniel estas ebla, akiri unu ruĝan rozon?

— Unu rimedon mi scias, — respondis la arbo, — sed ĝi estas tiel terura, ke mi ne kuraĝas, ĝin diri al vi.

— Diru ĝin, — ekkriis la najtingalo, — mi ne estas timema.

— Se vi volas havi ruĝan rozon, — diris la arbo, — vi devas ĝin fari el kantoj dum lumbrilado kaj kolorigi ĝin per via propra korsango. Vi devas kanti por mi kaj premegi vian bruston kontraŭ dorno. Dum tuta la nokto vi devas kanti kaj la dorno devas trabori vian koron, kaj via vivosango devas flui en miajn vejnojn kaj fariĝi la mia.

— La morto estas alta prezo por unu ruĝa rozo, — diris la najtingalo, — kaj la vivo al ĉiuj estas tre kara. Gaja estas sidi en la verda arbaro kaj vidi la sunon en ĝia ora veturilo kaj la lunon en ĝia perla kaleŝo. Dolĉa estas la bonodoro de la kratago, kaj dolĉaj estas la kloŝfloroj en la valo kaj la eriko sur la montetoj. Sed la amo pli valoras ol la vivo, kaj kio estas birda koro kontraŭ homa koro?

Tial ĝi etendis siajn brunajn flugilojn, kaj levigis. Kiel ombro ĝi flugis tra la ĝardeno, kaj kiel ombro ĝi flugis tra la arbareto.

Tie ankoraŭ kuŝis la juna studento en la herbaro, kiel ĝi estis forlasinta lin, kaj la larmoj de liaj belaj okuloj ne ankoraŭ estis sekiĝintaj.

— Ĝoju, — ekkris la najtingalo, — ĝoju: vi havos vian ruĝan rozon. Mi ĝin elverkos dum la lumbrilado per kantoj kaj ĝin kolorigos per mia propra korsango. Ĉion, kion mi pro tio de vi petas estas, resti fidela al via amatino, ĉar la amo estas pli saĝa ol la filozofio, ankaŭ saĝa, kaj pli potenca ol la povego, kvankam ankaŭ potenca.. Brulkoloraj estas ĝiaj flugiloj kaj brulkolora estas ĝia korpo; ĝiaj lipoj estas dolĉaj kiel mielo, kaj ĝia spiro estas kvazaŭ bonodorfumo.

La studento ekrigardis el la herbaro kaj aŭskultis, sed li ne povis kompreni, kion la najtingalo al li diris, ĉar li komprenis nur la librojn.

Sed la kverko komprenis kaj fariĝis malĝoja, ĉar ĝi multe amis la malgrandan najtingalon, kiu estis konstruinta sian neston en ĝiaj branĉoj.

— Kantu al mi ankoraŭ unu lastan kanton, — ĝi murmuris, — mi sentos min tre izola, kiam vi forestos. — Kaj la najtingalo kantis por la kverko, kaj ĝia voĉo estis, kiel akvo fluanta el arĝenta kruĉo.

Kiam ĝi estis fininta la kanton, la studento leviĝis, kaj prenis kajeron kaj krajonon el la poŝo.

— Ĝi majstras la formon, — li diris al si, paŝante el la arbareto, — ĝi havas formotalenton tion oni ne povas nei; sed ĉu kun animo? Mi timas, ke ne: ĝi certe estas, kiel la plej multaj artistoj: ĉio estas nur stilo; ekzistas nenia vera interneco. Malverŝajne ĝi oferus sin por aliaj. Antaŭ ĉio ĝi pensas pri la muziko, kaj oni scias, kiel egoistaj estas la artoj. Sed oni devas konfesi, ke ĝi havas kelkajn belajn tonerojn en sia voĉo. Domage, ke ili havas nenian sencon, nenion ili esprimas, kaj estas sen ia praktika valoro. — Kaj li iris sian ĉambron, kuŝiĝis sin sur sian mallarĝan kampan liton kaj ekpensis pri sia amatino. Baldaŭ li ekdormis.

Kaj kiam la luno brilis sur la ĉielo, la najtingalo flugis al la rozujo kaj premegis sian bruston sur dornon. Dum tuta la nokto ĝi kantis, premante sian bruston sur la dornon; kaj la malvarma kristala luno malsupren kliniĝis kaj aŭskultis. Dum tuta la nokto ĝi kantis kaj la dorno penetris pli kaj pli en ĝian bruston, kaj ĝia vivsango forĝutetis el ĝi.

Unue ĝi kantis pri naskiĝo de l'amo en la koro de knabo kaj de knabino.

Kaj ĉe la pinto de la rozujo ekfloris belega rozo; folio aperis post folio, kiel kanto post kanto. Unue ĝi estis pala kiel nebulo pendanta super rivero; pala, kiel la piedoj de la mateno; kaj arĝenta, kiel laflugiloj de la krepusko. Kiel la silueto de rozo en arĝenta spegulo, kiel la silueto de rozo en lageto, tiel estis la rozo, kiu ekkreskis el la pinto de la rozujo.

Sed tiu ĉi vokis al la najtingalo, ke ĝi sin premegu pli intime sur la dornon.

— Vi premu pli forte, malgranda najtingalo, — ĝi kriis — alie ektagiĝos antaŭ la finigo de la rozo!

Kaj tial la najtingalo sin premegis pli forte sur la dornon, kaj ĉiam pli laŭta fariĝis ĝia kanto, ĉar ĝi kantis nun pri la vekigo de la pasio en animo de la geĥomoj.

Kaj gracieta ruĝo venis en la foliojn de la rozo, kiel la ruĝo sur la vizagon de fianĉo kianta la lipojn de sia fianĉino.

Sed la dorno ankoraŭ ne estis trapikanta ĝian koron kaj tial la koro de la rozo restis blanka, ĉar nur korsango de najtingalo povas kolorigi koron de rozo. Kaj la arbo vokis al la najtingalo, ke ĝi sin premegu ankoraŭ pli forte sur la dornon.

— Premu pli forte, malgranda najtingalo — ĝi kriis — alie ektagiĝos antaŭ la finigo de la rozo !

Kaj tial la najtingalo premegis sin pli intime sur la dornon kaj la dorno tuŝetis ĝian koron, kaj fortega doloro trankuris ĝin. Maldolĉa, ho ! maldolĉa estis la doloro ; pli sovaĝa, ho ! pli sovaĝa fariĝis la kanto, ĉar ĝi kantis nun pri la amobeligata de morto ; pri la amo, eĉ ne mortanta en la tombo. Kaj la mirinda rozo koloriĝis ruĝe, kiel la rozo de la orienta ĉielo. Ruĝa estis la zono de ĝiaj folioj, kaj ruĝa kiel rubeno estis ĝia koro. Sed la voĉo de la najtingalo plimalfortiĝis kaj ĝiaj malgrandajflugiloj komencis lace flugeti, kaj malpeza vualo etendiĝis antaŭ ĝiaj okuloj. Pli malforta, ho ! pli malforta fariĝis ĝia kanto, kaj ĝi sentis ion en sia gorgo.

Tiam ĝi ankoraŭ unufojon ĝemis je lastaj tonoj. La luno ĝin aŭdis kaj forgesis subakviĝi kaj restis sur la ĉielo. La ruĝa rozo ĝin aŭdis kaj ŝancelis pro ĝuego siajn foliojn al la malvarmeta matenvento. La eĥo ĝin forportis en sian purpurkavon en la montoj kaj vekis la dormantajn paŝtistojn el iliaj sonĝoj. Ĝi aervagiis super la kano ĉe la rivero, kaj tiu ĉi alportis ĝin al la maro. — Ha vidu, ekkriis la rozujo, — nun la rozo estas preta.

Sed la najtingalo nenion respondis, ĉar ĝi kuŝis senviva en la herbejo, kun la dorno en la koro.

Tagmeze la studento malfermis sian fenestron kaj rigardis eksteren.

— Ho ! kia miraklo kaj feliĉo ! — li ekkriis, — unu ruĝa rozo ! Mi neniam en mia vivo vidis tian rozon ĝi estas tre bela ; certe ĝi havas longan latinan nomon — kaj li klinis sin kaj deŝiris ĝin. Poste li surmetis sian ĉapelon kaj kuris al la domo de la profesoro, kun la rozo en la mano.

La filino de la profesoro sidis en la enveturejo, volvante bluan silkon sur bobenon ; kaj ŝia hundeto kuŝis ĉe ŝiaj piedoj.

— Vi diris, ke vi dancos kun mi, se mi al vi alportos ruĝan rozon, — diris la studento. — Jen la plej ruĝa rozo en la mondo. Vi portu ĝin hodiaŭ sur via koro, kaj kiam ni ambaŭ dancos, ĝi al vi rakontos, kiel mi vin amas.

Sed la knabino grimacigis la buŝon :

— Mi timas, ke ĝi ne konvenos al mia vesto, — ŝi diris; — kaj cetere, la nevo de la regna kasisto sendis al mi verajn juvelojn, kaj ĉiu komprenas, ke juveloj pli valoras ol floroj!

— Ha, vere! Vi estas tre maldankema! — kriis incite la studento. Kaj li ĵetis la rozon sur la straton, kie ĝi falis en koton kaj dispremiĝis de veturilo.

— Maldankema! — diris la knabino. — Mi volas al vi dirion: vi estas tre malĝentila! Kaj entute, kia do vi estas! Studento, nenio plu! Ŝajnas al mi, ke vi eĉ ne havas arĝentajn bukojn ĉe viaj ŝuoj, kiel la nevo de la regna kasisto!

Kaj ŝi stariĝis kaj eniris domenon.

— Kiel malsaĝa estas do la amo, — diris la studento, forivante. — Ĝi havas ne la duonan utilon de la logiko, ĉar ĝi pruvas nenion kaj ĉiam babilas, nenion efektivigante. Kaj ĝi kredigas aferojn, kiuj ne estas veraj. Efektive, ĝi estas io tute nepraktika, kaj ĉar nuntempe la praktikeco signifas ĉion, mi revenas al la filozofio kaj studos la metafizikon.

Tial li resupreniris al sia ĉambro, elserĉis grandan polvoplenan libron kaj komencis legadi.

OSCAR WILDE.

tradukis OTTO SIMON.

Bagateloj

Oni disputas pri Petro kaj Paŭlo.

— Ili estas riĉaj, bonkoraj egale...

— Tamen Petro pli valoras, ĉar li scias multajn lingvojn: li parolas angle, germane, france, itale.

— Bela afero! Paŭlo multe pli valoras li povas interparoli kun ĉiuspecaj aliĉanduloj

— Ne eble!

— Jes, tre eble! Mi vidis lin parolantan kun homoj el dudek nacioj diversaj.

— !!!

— En Boulogne, ĉe la Kongreso Esperantista!

P. CH.

Oni parolas pri la vojaĝoj de Cook. Iu naivulo subite demandas:

— Nu, ĉu Cook mortis dum sia unua vojaĝo?

P. CH.

Terkultura Kalendaro

(daŭrigo)

M A J O

Jen ekaperas majo, la plej bela el ĉiuj monatoj, monato de l'floroj, kiun la antikvuloj metis sub la protekton de la suna dio, Apolo. Preskaŭ ĉiuj majaj tagoj estis iam tagoj festaj ĉe la Romulidoj, kaj ni ankaŭ Francoj antaŭ nelonge, ĉu ni ne plantis meze de niaj placoj majan verdantan arbon, tiun gracion kaj maldikan poplon, kiel emblemon de pli bona spirado kaj de renoviĝo? ĉu la plej multaj eŭropaj popoloj, kiel ĉiu homo aparte, ne festas tiun monaton per multaj manieroj?

En tiu sezono, la brila suno, nian duonsferon suririnta, jam ekvatoron transiris je 60 gradoj. Tiam, kiel diras la poetoj, komenciĝas la edziĝfestoj de l'suno kun la tero; tiu ĉi ĝojege kronas sin per la plej delikataj kaj blankaj floroj, per lilioj, konvaloj, kratagoj, per jasmeno kaj hiacinto, puraj kiel la neĝo el kiu ili ĵus eliris; kaj, kiam ĝi estos faringinta patrino, ĝi tuj ornamiĝos lukse per belegaj kaj bonegaj fruktoj, kiel samtempe per riĉaj, vivkoloraj girlandoj; ĝia amema spirado rompas la ŝelon de la birdetoj en ilia nesto kiel ĝi naskas la lekantojn sur la herbejoj.

Majo estas la monato de l'najtingalo, kiun la grekoj tre amis pro ĝia melodia kantado; ĝi vere, dum majo, plenigas, niajn arbarojn per sia akraj notoj; post fino de majo, ĝi silentas.

La varmgrado pli altiĝis ankoraŭ je kvar gradoj super la aprila temperaturo. Tiam la tero trempita de pluvo kaj instigata de dolĉa varmo, nepre donacas siajn plej sufiĉegajn trezorojn.

« Kia vivo, ekkrias unu el niaj plej kleraj botanistoj, kiun ni plezure kaj laŭvorte citas tie ĉi, kia moviĝo en tiuj feliĉaj tagoj kiam la vintro tute forlasis niajn vastajn arbarojn, niajn kamparojn ekflorantajn!

« La plantsuko, ĉerpita el malseka tero, silente supreniras en la multombrajn nevideblajn kanalojn; ĝi dividas sin en la plej maldikaj branĉetoj; la burgonoj estas malfermataj; la plej malfruaj arboj montras siajn foliojn; la kverkoj lasas flirti siajn floritajn foliaretojn; la betulo malvolvas siajn pendajn spikojn; acero balancas siajn longajn berarojn, kaj fagoj je majstra pinto, lasas diveni, sub travidebla kaj freŝa foliaro, la lulilon de siaj fruktoj, kaj la modestan koloraĵon de siaj floroj.

« La herbejoj kaj arbaroj prezentas la strangajn florojn kaj ĉarmajn spikojn de la Orkideoj; aliloke ekfloras la plumfaskaj kronetoj de la arbara meliso, kaj la largaj spatoj de la

Arumo; la rando de la arbaroj ornamiĝas per fusanoj, nerprumoj kaj viburnoj je neĝaj kronoj, kaj je lobaj folioj. La persikuj, kiuj rozkolorigis la montetojn apud la blankaj migdalujoj, perdis sian unutagan ornamajon; sed milkroneta, la kratego, kunulo de la plej belaj tagoj de l'jaro, dolĉe movigas siajn florajn girlandojn; la stipoj je oraj floroj ĝojigas ĉiujn dekli-vojn, la narciso de l'poetoj parfumas la herbejojn..... »

Tamen, kvankam la naturo zorgas pri siaj kreskaĵoj, ni devas ankaŭ ĝin helpadi.

Pri niaj *floroj* ni bezonas vitraĵojn formeti dum la tago, fini ĉiujn semadojn de l'jaraj kreskaĵoj, repiki kreskaĵojn por la aŭtunaj garnituroj, daŭrigi la semadojn de la dujaraj kaj persistaj kreskaĵoj por la venonta jaro, ĝustlokigi ĉiun ornamasomeran kreskaĵon; eligi ĉiujn kreskaĵojn el la orangerio; elfari la lastajn plantadojn.

Oni povas en tiu jarsezono konfidi al tero la plej multon de la *legomaj semoj*: diversaj fazeoloj, diversaj brasikoj, spinacoj, somera latuko, porelo, rafaneto, skorzonero, ktp.; ĉiuj tiuj semadoj estas farataj ĉu linie, ĉu jetfluge; pli aŭ malpli kovrante la semojn laŭ ilia dikeco.

Kvankam oni kutimas ofte planti fazeolojn per plenmanaj amasetoj en truojn, ni rekomendas tamen la semadon laŭ linioj, profundaj je 6 ĝis 8 centimetroj, por la malgrandegaj fazeoloj. Oni interspacigas la liniojn je 30 centimetroj. La plej bonaj variedoj por tiu kulturo estas: la fazeolo *Flageollet-Chevrier*, la fazeolo malgrandega *beurre d'Alger*, la fazeolo *Incomparable* kies fibraĵoj estas tre ŝatataj tiel same kiel la grajno.

Oni daŭrigas rikolti la produktaĵojn de l'bedoj: salaton, karotojn, rafanetojn. Oni prizorgas la semaĵojn de brasikoj, kiuj en la varmaj tagoj estas manĝataj de la altizoj; necesas tiam, ke oni varmetigu ilin ofte, aŭ ke oni ŝutu sur ilin sufiĉe da ĉevala sterkaĵo por forigi momente tiujn insektojn, aŭ ankoraŭ ke oni ŝmiru unuflanke per gudrono tabulon kaj promenigu ĝin super la semaĵoj. La altizoj saltas pro la plej malgranda brueto, kaj gluigas sur la gudritan parton.

La legoma gardeno sufiĉege tiam ekproduktas: asparaĝojn, Jork-brasikojn, fruajn pizojn, latukojn, rapojn. Ne timu surverŝi akvon, sed vespere, precipe kiam la tago esti varma. Semu legomojn, translokigu salatojn, el kiuj la romanajn vi ligos por ke ili blankiĝu; ĝustloku la tomatojn elkreskintajn sur bedo, repiku la frizitan cikorion. Oni maldike semas la sovaĝan ĉikorion difinitan por farigi la vintra « kapuĉena barbo »

Tre bone estos, en la *frukta gardeno*, pinĉi je ok aŭ dek centimetroj la junajn kreskaĵetojn de l'arboj; fiksi la branĉojn de l'persikuj; forpreni kelkajn fruktojn el la persikuj aŭ abrikotuj, kiuj estus tro ŝargataj; prizorgi la fendajn greftaĵojn, komenci la flutbegan greftadon.

Se vi kulturas la melonon, faru ordinare en tiu monato la unuajn plantadojn sur neŭtrajn bedojn; nature la specialis-

toj sin metas ekster tiu regulo. Tuj kiam la du fundamentaj folioj estas tute vastigataj, vi devas fari la unuan *tondon* aŭ *senkapigon*, je kelkaj centimetroj super tiuj du folioj, celante vastigi la du *brakojn*. Kiam la unua tondo estas efektivigita, vi saĝe faros, pajligante la teron de ĉiu vitraĵo per « rekuirita » sterkaĵo. Prizorgu la detruadon de la puletoj per tabaka suko, miksitita nun 1/12-ono da akvo, aŭ plie, laŭ ĝia grado. Oni sukcesas ankaŭ uzante hipnolon miksititan kun tridek oŭ kvardekobla kvanto da akvo.

Tondu ankaŭ la tomatojn kaj kukumojn, kulturitajn sub vitraĵo; ju malpli fruktojn vi lasos sur tomataj kreskaĵoj, des pli belaj kaj fruaj vi atingos ilin. Kukurbojn metu en plenan aeron, kaj senkapigu la trunketojn de kukumetoj por ke ili pli multe branĉetiĝu.

Ni aldonas ankoraŭ mallonge la jenajn sciigojn; fiksi per branĉetoj la pizojn aprile semitajn; pinĉu la pintojn de tiuj, kiuj ekfloras; pinĉu la florantajn fabojn; semu dufoje, ĉiu dusemajne, plenaere, la pizojn kaj fazeolojn; branĉaranĝu, tuj kiam ili estas elirintaj el tero la fazeolojn de suprenrampontaj specoj; prizorgu la rikolton de la asparagoj, ne vundante per tranĉilo la kronon de la bulbidoj; surverŝu sufiĉege la artiŝokojn; malsekigu la kvarsezonajn rozujojn, precipe kiam alproksimiĝas fulmotondro, pro la malutila elektrizita pluvo; ŝutu sub ombraĵo semon de kvarsezonaj fraguoj, por plijunigi la plantejon; repiku la fragujajn kreskaĵetojn sur ombratan ters-trion; formetu de nun ĉiuspecajn ŝirmilojn, ĉar fine de l'monato, ĉirkaŭ la 20^a, la frostoj estas ja maloftaj same kiel la malvarmaj pluvoj. Ni povas samtempe komenci almeton de kupraj ŝlimaĵoj.

Ni kutimigos al aero la kreskaĵojn por somera ornamado kias kestaĵojn vi tre bone elirigos kiel eble plej ofte. De la 25^a ĝis la 30^a, renio malhelpas masivigi la plej fortajn el ili, rezervante por la unuaj tagoj de junio la plej delikatajn, kiel koleusojn, nome. Kiam oni ne povis disponi bedojn, oni devas plenteren semi la semojn havatajn: kapucinojn, balzaminojn, hindajn diantojn, hindajn rozojn, lekantojn, ktp., kaj tiujn semojn kovri per unu centimetro da tero.

En la *parkoj*, oni devas tondi la arbetojn antaŭe florintajn; oni forigas parton de la branĉetoj ekflorintaj, konservante la junajn fortikajn.

En la *flordomoj* oni povas ĉesigi ĉiun hejtadon, krom en la varmejoj. Varmetigu laŭbezone, sed almenaŭ unufoje ĉiutage. En la varmetaj aŭ malvarmaj flordomoj, ĉiam aerumu eĉ nokte, kiam oni ne timas la prujnon. Cetere, (kaj ni jam tion diris supre) en la dua maja duono, estas sendanĝere eligi el la orangerio ĉiujn ornamajn kreskaĵojn, metitajn en potojn aŭ en kestojn: oranĝujojn, granatujojn, rozkolorajn laŭrojn, mirtojn, ktp.

Ni tro insistas eble pri la floroj, sed oni senkulpigos nin pri tio, ĉar en la delikatega jarcento je kiu ni vivas, la amo al floroj fariĝis senĉese pligrandiganta bezono. Niatempe senflora

salono ŝajnus tiel nuda, kiel senmebla ĉambraro, kaj niaj ĝardenoj ŝajnus al ni malĝojaj, se ili ne radius pro la ĉarmo kaj beleco de la milkoloraj floroj.

Utilon por agrablo ni ne forlasu tamen, kaj ni reeniru la *farmdomon*.

Tial, ke ekvarmiĝas, bone estos surverŝi la sterkaĵojn per sterkfluidaĵo elĉerpita el kavujoj aŭ akvaĵoj, por eviti la sekigon kaj la ŝimon aŭ *blankaĵon*.

Oni kutimigas iom post iom la bestojn al verda nutraĵo, kunmiksante tiam kun ĝi sekan furaĝon; tiu miksaĵo multe taŭgas por malaperigi la sufiĉegan malsekecon de l'verdaĵo.

Pri la ĉevaloj, iaj agronomiistoj malpermesas sangeltiron; pli utilas, diras ili, refreŝigi la ĉevalojn unufoje ĉiutage per farunaĵoj, kunmiksitaĵoj kun brano, en unu sitelo da akvo por du ĉevaloj. Modere donu al ili verdan trifolion, ses porciojn ĉiutage en tri manĝadoj kun pajlo inter la manĝoj; kaj tre prizorgu purecon en ĉevalejoj por forigi miasmojn.

Bonega sezono ankaŭ por la bovidoj, ĉar la naskintaj bovinoj donas multe da lakto, pro sufiĉega verdaĵo. Kiam la bovidoj estas suĉintaj dum dekkvin tagoj, oni eligas ilin; oni elnutras ilin dum ses monatoj per lakto, farunaĵoj, kaj iomete da verda trifolio.

La ŝafidoj, naskiĝintaj en januaro kaj februaro, jam sin ekpaŝtas, sed vi zorgos eviti tro nudan sunon, kiu malutilas al ili. Pri la ŝafidoj difinitaj por buĉejo, vi daŭrigos ilin elnutri per lakto, fojno kaj grenaĵo. Oni uzas ordinare tiun tempon por enparkigi la ŝafojn, kaj tion oni faras per multaj diversaj manieroj, kiujn ni ne povas montri ĉi tie, sed oni tre atentos antaŭ ĉio la ŝvelon de l'bestoj pro la verdaĵo. Tiu ŝvelo estas kaŭzata de la fermentiĝo de iaj nutraĵoj (trifolio, luzerno) produktantaj gasojn en la ventro de la bestoj, tiamaniere ke tiuj ĉi riskas morti. Kiam ia besto ŝvelas oni devas rapide sorbigi de ĝi proksimume unu litron da amoniaka akvo; ĝi estas litro da ordinara akvo al kiu oni aldonis plenkuleron da amoniako. Oni savas ankaŭ la beston, borante al ĝi la maldekstran flankon por forigi la gasojn, sed, kvankam tio estas facile farebla, oni ne devas ĝin entrepreni se oni ne estas certa bone sukcesi. Oni konsilas ankaŭ doni al ŝvelintaj bestoj 250, 300, eĉ 400 gramojn da mara salo por la grandaj bestoj, kaj 30, 35 aŭ 40 gramojn por la ŝafoj, solvitajn en malmulta akvo. Cetere, tre ofte tujaj zorgoj, trinkaĵoj, klisteroj, premoj sur la ventro, sufiĉas por forigi danĝeron.

Verdaj kaj molaj furaĝoj tre utilas ankaŭ al porkoj. La porkidetoj, ses semajnojn post kiam ili naskiĝis estas apartigataj de sia naskintino; oni kondukas ilin sur la kampojn, kie ili manĝas herbojn, kaj en la arbarojn, kie ili trovas glanojn. Modera ekzercado taŭgas por ilia pligrandiĝo.

Vi atentos la birdkorton, ĉar la kovado ne estas ankoraŭ plenumita; vi ŝirmos kaj prizorgos la kokidetojn nove naskiĝintajn; vi kondukigos la anserojn en malsekajn paŝtejojn: tuj estos la momento rikolĝi la lanugon de iliaj plumoj.

Vi observos precipe, fine de l'monato, la eliron de la abelaroj. Tre utilas ja artefaritajn abelarojn fondi en la unuaj belaj tagoj, kaj vi tion atingos pli facile, metante pajlajn abelujojn proksime apud la abelejo. Kompreneble vi zorgos nutri la abelarojn, kiam la mielaĵo ne sufiĉas; kaj vi kunigos la malfortajn koloniojn kun la aliaj; vi nutrados ilin ankaŭ se, post kiam ili estos metitaj en abelujon, pluvas okaze dum kelkaj tagoj.

La senkulturejoj ricevas duan plugon en argilaj teroj. La terkulturisto devas tiam erpi terpomojn, hordeojn, avenojn; sarki brasikojn, karotojn; senkardigi tritikojn, hordeojn, avenojn.

La majaj semadoj en la kamparo estas la printempa kolzo, kanabo, kamomilo, verda maizo por verda furaĝo, milio, printempa vicio, grizaj pizoj, fazeoloj, brasikoj-napoj, brasikoj-rapoj, rutabagasoj, kaj sorgo.

Tiu ĉi lasta kreskaĵo bone sukcesas, kiel verda furaĝo, ĉar ĝi donas multajn rikoltojn. Oni semas ĝenerale 10 kilogramojn da sorga semo por hektaro, sur malpezajn, bone plugitajn terojn, en liniojn interspacigitajn je 40 centimetroj.

Pri la vinberujo, vi uzos la rimedojn kontraŭstarantajn al ĝiaj malsanoj, mildio, blakroto. Vi sulfurigos ĝin kontraŭ la la ojdio.

Paul CHAMPION

Al akciuloj de la Presa Societo

Ni sciigas la akciulojn de la *Preso Esperantista Societo*, ke la jara ĝenerala kunveno fariĝos dimanĉe, 27^{an} de majo, je la 10^a horo matene, ĉe la societa sidejo, 33, rue Lacépède, Paris.

Programo :

- 1° Raporto de la Administrantaro
- 2° Raporto de la kontrolisto
- 3° Aprobo de la kalkuloj kaj de la bilanco por la unua periodo 1905-1906.
- 4° Fikso de la monkvantoj difinitaj por la delegataj administrantoj, direktoro kaj kontrolisto dum la jaro 1906-1907.
- 5° Reelekto de unu membro de l'Administrantaro kaj elekto de du novaj Administrantoj.
- 6° Reelekto de la kontrolisto.

La reelektota administranto, lote montrita, estas por tiu ĉi jaro, S^{on} CART, prezidanto de l'administrantaro. Krom tio, la Administrantaro proponas altigi ĝis kvin la nombron de la administrantoj, kaj elekti kiel novajn administrantojn S^{on} BENOIT, direktoron de la Internacia Oficejo de peziloj kaj mezuriloj, membron korespondanton de la Franca Instituto, kaj D^{on} VALLIENNE, kiuj ambaŭ havas la nombron da akcioj difinitan de la regularo.

TRA LA MONDO, ESPERANTISTA

MOVADO ESPERANTISTA

Franca

Festoj esperantistaj fariĝis en diversaj grupoj. Tio estis okazo por propagandi kaj publikigi artikolojn en la loka gazetararo. Ni citu precipe la kunvenojn faritajn en Hâvre, Bourg, Versailles. En Parizo la « Centra Oficejo » organizis tre sukcesan feston kiun partoprenis diverslanda samideanaro.

Paroladoj estas faritaj de Sroj Cart en Nancy, Mesny en Cogalin, Muffang en Saumur, Devoucoux en Alfortville.

En la gazetaro ni rimarkis bonegajn artikolojn de Sroj Rousseau (*L'Industrie hôtelière*), Rigoir (*Le Radical*), Muffang (*Le Petit Courrier*), Evrot (*Bulletin de la Société des Naturalistes de l'Ain*, france kaj esperante), Robert (*L'Ouvrier peintre*), k. a. Bonaj neŝubskribitaj artikoloj aperis ankaŭ en multaj gazetoj, precipe en *Lyon républicain*, *Le Libéraire*, *L'Oise sténographique* (Kurso de Esperanto), k. t. p., k. t. p. — En *Le Pêle-Mêle* Sro Fred Isly daŭrigas batali por sia ideo, ke oni devas fondi internacian kolonion antaŭ ol propagandi lingvon internacian : li venu, 33, rue Lacépède : li trovos tiesian « kolonion ».

Angla

Paroladoj estas faritaj de Fino Schafer en Highburg, de Sroj J. Ellis en Keighley, Tomlinson en Egham, J.-C. O'Connor en Helmscott Club, G.-D. Buchanan en Edinburgh. — En Glasgow, la parolado farita de Dro Lloyd ĉe la Scienca Akademio kaj anoncita de ni en antaŭa numero, havis grandan sukceson.

La Internacia kongreso de komercaj komizoj akceptis Esperanton, kiel oficialan lingvon por estontaj internaciaj rilatoj de la membroj de la internacia federacio. Okaze de tiu kongreso, diversnaciaj samideanoj organizis feston kune kun la Londona klubo Esperantista. La graveco de tiu fakto estas tro videbla, por ke ni insistu pri ĝi; ni nur rememorigos, ke ĝi estas ŝuldata precipe al niaj Rouen'aj amikoj kaj ĉefe al Sro Gehet.

Gazetaro. — En diversaj gazetoj ni legis bonan raporton de Sro Thill kaj Fino Holt pri granda festo organizita de la grupo en Plymouth. Bonaj artikoloj aperis ankaŭ en *Uddington Standard*, *The Evening Times* (Glasgow), *Self-Educator* (Kurso), ktp., ktp.

La Kongreso. — De diversaj angloj ni recevis plendon, ke la dato de la Geneva Kongreso estas tiel malfruigita ĉar « la tuta angla instruistaro unuagrada ne povas ĉeesti pro la tiama finiteco de ĝia libertempo. » Tiun fakton ni signalas al la Organiza Komitato.

Germana

Grupoj fondiĝis en Magdeburg (Sekr. : Sro Gericke, Scharnhorststrasse, 10), Silezia vilaĝo Kotzine (Sro Pudritzki, instruisto), kaj en Merseburg.

Paroladoj estas faritaj de Sroj Peters en teknika societo frankfurta, Stoll en Hanau. Kursoj novaj estas komencitaj diversloke (Berlin, Stuttgart, Halle, Hamburg-Altona).

Gazetaro. Bonaj artikoloj, diras nia kolego *Germana Esperantisto*, aperis en *Das Echo*, *Die Weltwarte* (Sro Otto Simon), *Frankfurterwarte*, *Münchener Neueste Nachrichten*, *Ludwigsburger Zeitung*, *Frankfurter Oderzeitung*, *Münchener Allgemeine Zeitung*, *Leipziger Neueste Nachrichten*, *Wiesbadener Tageblatt*, *Breslauer Zeitung*, *Leipziger Tageblatt*, *Lokalanzeiger*, *Papierzeitung*, ktp.

Bohema

Esperantista klubo en Praha havis trian ĝeneralan kunvenon en kluba sidejo 26-I.06. Prezidanto V. Kraus kaj sekretario E. Kühnl raportis pri laborado de klubo en ĝia tria jaro. Doni detalan resumon de iliaj raportoj rilate eksteran propagandon estus senutile, ĉar pri la memorindaj progresoj oni jam raportis aparte. Do ni aludos nur vivon internekluban, kiu ankaŭ estis ĉiam tre vigla. Ĉiusemajnaj kunvenoj membraj estis multenombre vizitataj kaj la geĉeestantoj ĉiam tre amuziĝis, ĉu per esperanta interparolado pri semajnaj okazintaĵoj, ĉu aŭskultante paroladon, kiu estis en kunveno farita de ia klubano; el tio estas plej bone videbla la intereso de membraro. La diverseco de temoj montras, ke Esperantistoj pri ĉio povas paroli, pri ĉio havi intereson, de temoj sciencaj ĝis temoj plenaj da humoro kaj poezio. Jen nomaro de titoloj ankoraŭ nepublikita: La framasonoj; Rimarkoj pri framasonismo; Rimarkoj pri spiritismo; Francaj verkistoj kaj bohema problemo; Pri fabrikado de papero; Natursciencaj notoj pri preparado de pano; Pri problemo de la lingvo internacia; Pri Esperanto en Leipzig; Kritiko de proponoj faritaj al kongreso rilate internacian organizacion; Gajaj du tagoj esperantistaj en Plzen; El historio de Volapük; Rememoroj de Esperantisto el London; Esperanto kiel rimedo disvastigi la konecon pri nia nacio inter fremdularo; Plej dolĉa mortado; Serĉado de loĝejo; Kapor-namo; Elrabita paroĥejo; Memoraĵoj de viro al kiu neniam io okazis; Mozart en Bohemujo; Praha kaj fremduloj; Amindumo

de Franca Sako; Fazeoloj de Pitagulo (laŭ letero de korespondanto).

Por ke amikaj interrilatoj de membroj daŭru kaj plifortigu, la komitato aranĝadis ekskurjon en ĉirkaŭ sraĵon de Praho, dum kiuj estis amuzado nur en nia simpla, fleksebla kaj belsona lingvo.

Bohema sekcio de Aŭstria ekspozicio en London invitis delegitojn de klubo Vojt Kraus kaj E. Kühnl en sian propagandan komitaton, kaj jam ofte sukcesis represigi sciigojn pri ekspozicio en ĵurnaloj fremdlandaj kaj en gazetoj esperantaj. Tiu agado estas tre grava, ĉar ĝi tre helpas al la klubo en ĝia laboro, montrante la praktikecon de lingvo internacia. Tial la klubo tre dankas ĉiujn samideanojn, kiuj helpis al ĝi, precipe gazetojn internaciajn, kaj denove petas ĉiujn, kiuj volas helpi al bona afero, por ke ili represu en ĵurnaloj de sia lando sciigon pri bohema ekspozicio el L. I. paĝo 224, tradukinte ĝin en lingvon nacian, kaj ke ili sendu la ĵurnalojn kun artikoloj al klubo. Sendi ilin estas necese, por ke la klubo havu montreblajn dokumentojn pri sukceso de sia propagando.

El aliaj raportoj estas rimarkinde, ke biblioteko de klubo enhavas jam 200 librojn kaj ke klubo abonas 20 gazetojn esperantajn, kiujn povas legi membrojn en membraj kunvenoj.

Je fino de kunveno estis elektita nova komitato por jaro 1906 jene: Vojteĉh Kraus prezidanto; Frand Kühnl, vicprezidanto, Stan Kamaryt, sekretario; Jan Hradil, kazisto; Stan Balik, bibliotekisto; V. Riegl, skribanto de protokoloj; Matylda Krausova, revidistino; kaj Ed. Kühnl. Anstataŭuloj de komitato: Vaclav Novak, Otakar Davidek, Jos. Barvir, Anda Bernardova. Revidantoj: M. U. Dr. Fr. Hanzelin, J. Fychtl. Anstataŭulo de revidantoj: Jos. Holub.

Prezidanto tre sincere dankis al Ed. Kühnl por lia laboro, kiun li oferis por klubo kaj ĉiuj membroj tre bedaŭris, ke E. Kühnl pro troa persona okupiĝo rifuzis resti sekretario.

Ambaŭ grupoj de klubo — la virina grupo en Praha kaj la grupo por Plzen — ankaŭ tre insiste laboradis por disvestigian ideon, kiel estas ankaŭ videble laŭ oficialaj raportoj senditaj de ili al la ĝenerala kunveno de klubo. Prezidantino de Unua virina grupo de E. k. en P estas Bozena Studnickova, sekretario Matylda Krausova; prezidanto de grupo por Plzen estas Xaver Kutilek, sekretario Jos. Pohl. En ambaŭ grupoj estas farataj kursoj por membroj, kiuj kunvenas ĉiusemajne.

Novaj grupoj de klubo estas fonditaj en Prosek kaj en C. Budejovice. Prosek estas malgranda urbeto apud Praha, somere tre ofte vizitata de loĝantaro de Praha; tiel havos nun Esperantistoj agrablan lokon por siaj ekskursoj, kiuj tiel fervore estis aranĝitaj lastjare, kaj kiuj ankaŭ tiujare promesplene komencis. Al fondanta ĝenerala kunveno de grupo alveturis el Praha 12 fervoraj samideanoj kun sia prezidanto, Sro V. Kraus. Jen nomaro de grupa komitato:

esperantaj. La internaciaj radikoj ne estas kunpresitaj. — La « ŝlosilo » estas la traduko por francoj de ĉiuj radikoj entenataj en la « Radikaro ». Tiamaniere oni povas ricevi plenan radikvortaron Esperanto-francan por tre malalta kosto. Sen ia dubo, tiu eldono farita por blinduloj alportos do ankaŭ grandan utilon al la neblinduloj.

Commentaire et Questionnaire, par TH. CART 0 fr. 25 ; afranke : 0 fr. 30.

Jen estas la kvara volumeto de la serio komencita de nia bonega « lernolibristo » Th. Cart sub la nomo « Premières Notions d'Esperanto ». Tiu parto reprenas la « Bildaro » kaj komentarias la diversajn frazjon kiujn ĝi entenas, montrante la diversajn paragrafojn de « Premières Notions », kie oni povas trovi la regulon uzatan en ĉiu aparta okazo. Krom tio estas detala demando por ekzercadi la lernantojn je la buŝa uzado de nia lingvo. La granda sukceso de la unuaj volumetoj de tiu serio, kies miloj da ekzempleroj disvendiĝis en kelkaj monatoj, certe estos sama ankaŭ por la nova verko, kiu forigas mankon ĝis nun tre sentitan en nia lernolibraro.

Le Français enseigné par l'Image, 0 fr. 25 ; afranke : 0 fr. 30.

Tiu ĉi broŝureto estas la franca traduko de la « Bildaro ». Aldoninte al ĝi la saman kolorpentritan desegnaĵaron, kiu estas en la bildaro, la eldonantoj faris el ĝi tute apartan lernolibron, kiu povas tiel bone servi en la kursoj de Esperanto por francoj kiel al tute ne esperantistoj por ekzercadi sin en la franca lingvo.

Abrégé de Grammaire Esperanto par H. SENTIS 0 fr. 15 ; afranke : 0 fr. 20.

Sr^o Sentis, nia konata propagandisto en Grenoble kaj la fama aŭtoro de la delikata versajaro « En Montoj » havis la bonan ideon eldonigi en aparta broŝureto la rimarkojn, kiujn li plej ofte havis okazon fari en sia instruado de Esperanto. La libreto estas do bonega gvidilo kaj plano por publika kurso de nia lingvo ; ĝi entenas la tutan grammatikon, la tabelon da vortoj simplaj, la afiksaron, multajn rimarkojn kaj kelkajn ekzercajn frazojn. Entute ĝi formas beletan broŝureton por lernantoj.

Elementa Fotografa Optiko, de KARLO VERKS. Unu volumo 80-paĝa, kun figuraĵoj, 1 fr. 25 ; afranke, 1 fr. 40.

Al ĉiuj legantoj de « Scienca Revuo » ne estas bezone longe rekomendi la nomon de Sr^o Verks, kiu tiel ofte jam en la nomita gazeto tiris la atenton al siaj ŝatindaj kaj praktikaj artikoloj pri la fotografio. Nun li havis la bonegan ideon unuigi en eleganta volumo ĉiujn elementajn konojn necesajn por scii tion, kio okazas en fotografa objektivo kaj kio estas nepre necesa por konvene uzi sian aparaton. Multaj figuraĵoj

iluminas kaj klarigas la tekston kaj faras ĝin facila eĉ por tiuj kiuj ne estas ankoraŭ tre lertaj matematikistoj aŭ... Esperantistoj. Tabeloj kaj vortaro finas la volumon kaj faras ĝin vera poŝlibro de la fotografanto.

La sukceso de tiu eldono estos ankaŭ des pli granda, ke ĝi difinas multajn teknikajn vortojn en Esperanto kaj plenigas novan fakon de niaj teknikaj vortaroj. Jam diversaj legintoj proponis traduki ĝin en diversajn naciajn lingvojn : tio estas la plej bona pruvo pri ĝia utileco kaj plaĉeco.

La Benkoj de la Promenejo, tedmonologo de Coquelin tradukita de P. CORRET, o fr. 20 centimoj; aŭfranke, o fr. 25.

Tiu amuzanta monologo, tre facile komprenbla, estas la aparta reeldono de la lerta traduko de S^{ro} Corret aperinta kun nia januara numero. Nun ĝi estas facile ricevebla por ĉiuj, kiuj volos gajigi la esperantistajn kunvenojn.

Literatura Aldono de Lingvo Internacia, jaro 1905. Unu volumo 280-paĝa, 2 fr. 50; aŭfranke, 2 fr. 80.

La nova formo donita al la « Aldono » de L. I. komence kun la jaro 1905^a ebligis konsistigi interesan kaj belan bibliotekan libron per la jara kolekto de la aldono. La rakontoj entenataj en ĝi estas: La Horlo, de Guy de Maupassant; Paska Nokto, de Vladimir Korolenko; Perdita kaj Retrovita, de Emile Boirac; Paŭlo kaj Virginio, de Bernardin de Saint-Pierre; Ruĝa Floro de V. Garŝin; La Patro de Pestuloj, de J. Slowacki; Neniam estas pli bone ol malfrue, komedieto; Grasa Lignajisto Firenza Novelo; Dum atendo de l'Pramo, de Ivan Malteliĉulo. Inter la nomoj de tradukintoj ni trovas S^{rojn} Vejtcler, H. Hodler, K. Boguŝeviĉ, A. Grabowski, H. Bulthuis, L. Touchebeuf, G. Chavet.

La supre nomita verkaro kaj aŭtoraro ne necesigas pluán laŭdadon pri la nova libro, dank'al kiu tre riĉigis la biblioteko de nia lingvo.

Ho mia kor'! muziko por kanto kaj fortepiano de S^{rino} Guivy, laŭ la bela versaĵo de D^{ro} ZAMENHOF, estas tre aplaŭdita en la Boulogne'a Kongreso. Nun ĝi eldoniĝis por la profito de la propagando inter blinduloj: sen ia dubo, ĉiuj niaj legantinoj volos posedi tiun harmonian muzikaĵon. Prezo afr.; 1 fr. 10.

Grasa Lignajisto, Firenza novelo de nekonata aŭtoro, tradukis GABRIEL CHAVET. Unu broŝuro 20-paĝa, o fr. 50, aŭfranke o fr. 55.

« La novelo, kiun tradukis nia kunlaboranto, estas verkita dum la XV^a jarcento kaj eliris unuafoje en la eldono de *Decameron* de BOCCACIO, farita en Firenzo de GIUNTI dum la jaro 1516^a. »

Tiel la tradukinto klarigas al ni en antaŭparolo tion, kio estas la ĵus nomita novelo. Kaj li plue montras, ke en la

rakonto aperas multaj el la tiutempaj artistoj ankoraŭ nun famaj kies nomojn aŭdas ofte la turistoj kaj vizitantoj en Italujo. La temo estas mistifiko, simila, je tiuj kiuj naskiĝis en artaj laboroj. La esperanta laboro estas facile legebla kaj agrabla: cetere la nomo mem de la tradukinto sufiĉas por certigi pri tio.

Al la komencantaj Esperantistoj, mi devas tamen montri kelkajn bedaŭrindajn enŝovingintajn erarojn, por averti la imitadon. *Post* ne devas esti antaŭ gerundio, (ekz. *post laborinte*; « laborinte » sola sufiĉas); aliparte *je* ne estas uzata antaŭ infinitivo (*kapabla je fari* devas skribiĝi *kapabla fari*); fine *drapo*, estas francaĵo anstataŭota de *littuko*. F. A.

Esperantaj Rakontetoj de diversaj aŭtoroj. Unu broŝuro, o fr. 50 centim. afr. Tiu libreto konsistas el la kvar lastaj kajeroj de la literatura aldono de L. I., jaro 1904, ĉar la aldono en tiu tempo enhavis nur mallongajn rakontojn, la libreto hodiaŭ aĉetebla formas verkareton facilegeblan kaj utilan por multaj lernantoj kaj profesoroj. En 58 paĝoj ĝi liveras ses novelojn, kelkajn versaĵojn kaj nekalkuleblan kvanton da miksaĵoj, bagateloj, aforismoj amuzaĵoj, ktp.

Mallumaĵoj, de Abonyi Arpad, traduko de LENGYEL. PAL. o fr. 60 centimoj, afr. o fr. 65.

La legantoj de nia « Aldono Literatura » multe ŝatis la verkon, kies apartan eldonon ni prezentas hodiaŭ al la publiko. Verkita tre simple sed tre vereme, ĝi estas la kortuŝanta aventuro de kelkaj personoj turmentataj de la socialaj antaŭjuĝoj. Nia malnova samideano, P. Lengyel, tradukis ĝin tre lerte, en tute klara kaj facila lingvo, kiu donas la iluzion de originala verko. Sen ia dubo niaj legantinoj tre ŝatos kaj disvastigos ĉirkaŭ si tiujn legindajn paĝojn.

LASTE APERINTAJ VERKOJ

(La ĉefajn el tiuj eldonaĵoj ni poste analizos, kiam estos loko).

Oficiala protokolaro de la Unua Kongreso Universala de Esperanto: o fr. 30 centim. afr. : o fr. 35.

Detala Raporto stenografia de la Unua Universala Kongreso de Esperanto, verkita de Pastro Schneeberger, kun aldono de l'oficiala protokolaro, 1 fr. 40; afr. : 1 fr. 50.

Programme du certificat d'études et du Certificat de capacité: o fr. 25 kaj o fr. 30.

Homaranismo, sen prezo kaj sen nomo.

Cindrulino, laŭ angla rakonto esperantigita de L. Milho (kun figuraĵoj): o fr. 55 kaj o fr. 60.

Dictionnaire Esperanto-Français, de L. de Beaufront, nova eldono.

Vocabulaire Français-Esperanto, de Th. Cart, M. Merckens et P. Berthelot, nova eldono.

- Le triomphe de l'Esperanto est-il certain*, par H. Sentis, propaganda broŝuro (sen prezo).
- Tri ĉapitroj de Donkiĥoto de Manĉujo*, esperantigitaj de C. Bourlet, V. Inglada kaj Geo. C. Law. 0 fr. 55 kaj 0 fr. 60.
- Pola Antologio*, elektis kaj tradukis Kabe. 2 fr. kaj 2 fr. 20.
- La Interrompita Kanto*, de Eliza Orzesko, traduko de Kabe. 0 fr. 85.
- Poŝlibro internacia por aferistoj turistoj*, k. c., de G. Norman, (Gregoria kaj Julia kalendaroj, rapidega ĉiama kalendaro, eŭropaj kaj amerikaj internaciaj egalecotabeloj pri moneroj, pezaj, mezuroj, kutimaj komercaj prezoj), 2 fr. kaj 2 fr. 10.
- Verkaro*, de V. N. Devjatnin, libro unua (nur versoj), 2 fr. kaj 2 fr. 25.
- Plena Verkaro*, de Devjatnin, libro dua: (prozoj kaj versoj): 2 fr. 75 kaj 3 fr.
- Une langue Internationale: L'Esperanto*, par le Dr Saquet propaganda artikolo por francoj (sen prezo).
- Le Premier Congrès Espérantiste*, par le Docteur Saquet, propaganda artikolo france skribita (sen prezo).
- Lernolibro de Esperanta Stenografio* (Unuiga sistemo Stolze-Schrey) verkita de F. Schneeberger, 1 f. kaj 1 fr. 10.
- Esperanto*, an international language, propaganda broŝuro angla por bon-templanoj, verkita de Ed. Wawrinsky, international Chief Templar (sen prezo).
- Hispana jarlibro Esperantiŝta* por 1906 (sen prezo).
- Nyckel till Esperanto*, propaganda ŝlosilo por svedoj: 0 fr. 05.
- Esperanto utan Lärare*, af P. Ahlberg, meminstrua lernolibro por svedoj, 0 fr. 35 kaj 0 fr. 40.
- L'Esperanto*, par E. Sacré, propaganda broŝuro por francoj (sen prezo).
- Introduction à l'étude de l'Esperanto*, par Maurice Aubert, bona rememorigilo por profesoroj, kies lernantoj iom forgesis la signifon de la gramatikaj terminoj. 0 fr. 30 kaj 0 fr. 35.
- Tutmondaj fajro-kutimoj*, de H. W. Southcombe, studo pri diverspopolaj kutimoj, 0 fr. 45 kaj 0 fr. 50.
- Conference sur l'Esperanto*, par M. Evrot, propaganda parolado por francoj, (sen prezo).
- La tutmonda lernolibro por paroligi Esperanton*, de F. Maréchal, praktika libro por kursoj, tute en Esperanto. 1 fr. 10 kaj 1 fr. 20.
- Bidrag til Belysning af Spørgsmaalet om et International Sprog*, traduko de la broŝuro de la « Delegacio » farita de F. Skeel-Gjörlling, por danoj: 0 fr. 35 kaj 0 fr. 40.
- Kelkaj Floroj Esperantaj*, de A. J. Witteryck, numero 2^a. Aro da bagateloj kun ilustraĵoj: 0 fr. 25 kaj 0 fr. 30.
- A Primer of Esperanto*, propaganda lernolibreto por angloj: 0 fr. 20 kaj 0 fr. 25.
- Rapport sur la question de la langue universelle au XIV^e Congrès Universel de la Paix*, par G. Moch (raporto pri la

- demando pri helpa lingvo ĉe la Paca Kongreso). Bonega argumentaro kolektita france.
- Chiave del l'Esperanto*, itala eldono de la propaganda ŝlosilo Cefeĉ'a, o fr. 05.
- Progresos del Idioma Internacional*, por Luis Enrique Sepulveda Cuadra, propaganda artikolo por hispanoj (sen prezo).
- Kuracado de la Mallakso kaj de ĝiaj komplikoj* de Dr^o Mazeran : o fr. 60 kaj o fr. 65.
- Tridek Esperanto-Lecionoj laŭ la Gouin-Metodo*, tradukitaj de Dr^o Mayer (sen prezo).
- Dektriope*, unuakta salona komedio, tradukita de A. Gallois, o fr. 80.
- Lessons in Esperanto*, by G. W. Bullen, on the basis of « Ekzer-caro », plena kurso por angloj kun multaj komercaj aŭ teknikaj terminoj (sen prezo).
- Rezisteco de la ferkolonoj*, de Dr^o F. Villareal, teknika laboro kun hispana apuda traduko. (sen prezo).
- Transcription phonétique Universelle*, par J. Zimmermann, 2 volumoj, 6 fr. Universala sistemo stenografia, uzebla ankaŭ por Esperanto.
- D'une Langue Auxiliaire Internationale au point de vue du Droit des Gens*, par L. Fauvart-Bastoul. Bonega pruvo pri neceseco de lingvo internacia por juristoj, kaj fundamenta studado de la demando (franclingve) (sen prezo).
- Do You Know Esperanto*, propagandilo por angloj o fr. 10 kaj o fr. 15.
- La Kongresa Preĝo*, de Dr^o Zamenhof : o fr. 10 kaj o fr. 15 (kun angla traduko).
- Flugintaj Revoj*, de Paŭlo Wachs, muziko laŭ vortoj de A. Grabowski 2 fr.
- Bakĥfesteno*, muziko de Chopin, trad. de Fjodorov : o fr. 50.
- Serenado*, muziko de Pomerancev, trad. de Fjodorov: 1 fr.
- Kvarvoĉaj Kantoj por Esperantistoj* (ĉiuj el la fundamenta krestomatio) : o fr. 60 et o fr. 65.
- Vocabulario Italiano-Esperanto*, di Prof. L. Giambene : 1 fr. 25 kaj 1 fr. 50.
- Kio povas okazi se oni donacas surprize*, humoraĵoj de Fritz Reuter, traduko de Cefeĉ, (kun ilustraĵoj) : o fr. 70 kaj o fr. 80.
- Albumo de konataj Esperantistoj*, de Fr. Schuck : 2 fr. 30 kaj 2 fr. 40.

Presejo de la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris

Administrantaro : **Th. Cart**, prezidanto; **Paul Fruictier**, **Ch. Vêrax**, deleg.;
Sekretario de l'administrantaro **V. Chaussegros**.

Teknika direktoro : **Lengyel Pál**.— Sekretario de la gazeto : **William Mann**.

L'Imprimeur-gérant : P. Fruictier

Gazetoj Esperantistaj

L'Espérantiste, oficiala revuo de la Societo franca por la propagando de Esperanto, 24 paĝoj (formato 15 × 20) da teksto franco-Esperanta aŭ nur Esperanta, 8 paĝoj kovrilaj (nomaroj de Esperantaj verkoj kaj de ĉiuj grupoj de la S. f. p. E.) ; *Internacia Korespondado Esperanta* senpage disponebla por la abonantoj — 3 fr. 50. *Jarabono* (1-a de januaro, aprilo, julio, oktobro) *en Francujo* : 3 fr, *ekster Francujo* : 3 fr. 50 ; kun enskribo en la francan Societon 4 fr. ĉie. — Adreso de l' administracio *Louviers* (Eure) France.

Espero Katolika, revuo monata tute en Esperanto. Rakontoj, artikoloj pri nuntempaj aferoj, ŝakoj, k. c. Jare : 5 fr. (en Franclando 4 fr.) — Presejo A. BARBOT, 15, rue Etienne Pallu, *Tours* (France).

Espero Pacifista, monata organo de l'*Internacia Societo Esperantista por la Paco* (krom avizo kontraŭa, la abonintoj estas enskribitaj kiel aliĝantoj al la Societo). — Jara abono (aŭ minimuma kotizo) : 5 frankoj. La Societo akceptas ankaŭ opajn aliĝojn. — Sin turni al S-ro GASTON MOCH, 26, rue de Chartres, *Neuilly-sur-Seine* (France).

Germana Esperantisto, organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj. Eliras 12 fojojn jare. Redaktata germane kaj esperante. Jara abono 4 frankoj. Administracio kaj Redakcio : Esperanto Verlag, MÖLLER & BOREL, *Berlin, S.*, 95, Prinzenstrasse.

The British Esperantist, oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio ; 12 paĝoj da novaĵoj k. c. anglo-Esperante, kaj 8 paĝoj da Aldono tute en Esperanto. Jare 4 fr. (sen Aldono, 2 fr.). — Oni abonas ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13 Arundel Street, Strand, London.

Tra la Mondo, tutmonda multilustrata revuo monata, tute en Esperanto. — Nuntempaĵoj, Pri Esperanto, Arto kaj Literaturo, Sciencoj, Komercio kaj Industrio, Militistaro, Maristaĵo, Teatro, Sportoj, Virina kaj Gejunula paĝo, Felietono, Konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Ĉiuj artikoloj estas verkitaj de anoj de l'landoj aludataj. — Jare 8 frankoj ; kvaronjare, 2 fr. 25. — Redakcio : S-ro MONTROSIER, 8bis, rue de l'Ecu d'Or, *Orléans* ; Administracio 15, Boulevard des deux Gares, *Meudon* (S.-et-O.) France.

La Belga Sonorilo, organo de la Belga Ligo Esperantista. Eliras 12 fojojn jare. Redaktata france, flandre kaj esperante. Jara abono : 4 frankoj. — Redaktoro-administranto, al kiu oni ĉion sendu J. COOX, *Duffel*, Belgique

Internacia Revuo Medicina, monata organo por praktika medicino, redaktata en Esperanto kaj diversaj lingvoj naciaj, de diverslandaj kuracistoj. Ĉelas ne nur la Esperantan, sed ankaŭ la kuracistan utilon. Jara abono 7 fr. (en Franclando 6 frankoj. PARIS, 33, rue Lacépède.

Esperanta Ligilo, ĉiumonata revuo, TH. CART, ĉefredaktoro, 12, rue Soufflot, Paris V. — Abonkosto : 3 fr. jare. Dua jaro (1905), n-ro 5—6 (septembro-novembro).

Esperanto, scienca kaj literatura ilustrita monata revuo. En la lingvoj Esperanta kaj hungara.

La jaran abonpagon (4 fr.) sendu al la redaktoro MARICH ÁGOSTON, Papnövelde-utca 6, Budapest, IV, (Hungarujo).

Ruslanda Esperantisto, ĉiumonata organo de la Societo « Espero » en Esperanto kaj parte en rusa lingvo. — Diversspeca, interesa kaj bonstila literatura materialo : artikoloj pri la problemoj de lingvo internacia kaj pri Esperanto ; vasta kroniko de Esperantista movado (propraj korespondantoj) kaj bibliografio ; social-politika fako ; novaj famaj beletristikaĵoj (interalie en 1906 j. estas presata la « Ruĝa Rido » de L. Andrejev), versaĵoj kaj multaj aliaj. — La detalaj prospektoj estas riceveblaj senpage. — Adreso : Ruslando, St.-Peterburgo, B. Podjaĉeskaja, 24, la Societo « Espero ». — La jara abonpago (kune kun membriĝo en la Societon) 3 rubloj (7 fr. 50).

Juna Esperantisto, ilustrata gazeto por junuloj, instruistoj kaj Esperanto-lernantoj. Eliras monate. Literaturaĵoj, teatraĵoj, karikaturaj. Jara abono 2 fr. 50. Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

« **Esperanto** » propaga gazeto en lingvo franca.

Unu numero 10 centimoj, 24 numeroj sinsekvaj 3 fr. Sin turni al la Presa Esperantista Societo, aŭ al l'administranto de Esperanto Sinjoro PAUL BERTHELOT, Céret, P.-O. Franclando.

Paris 18^e, 23, rue Ganneron, AMEDIE GABET, deziras intersanĝi poŝtkartojn ilustritajn kun fremduloj ; ĉiam respondos per belegaj vidaĵoj parizaj.

Esp. 8684, kiu faras kolekton da ĵurnaloj Esperantaj, petas ke oni afable sendu sciigojn pri Esp. ĵurn. kiuj ne plu eldoniĝas ; nome, pri adreso de la Redakcio, prezo, kaj datoj de la unua kaj lasta numeroj de ĉiu ĵurnalo. Danke ricevus ekzemplerojn de malaperintaj ĵurnaloj, se oni bonvolus ilin sendi. — H. F. BAILEY, 31 Caversham Road, Kentish Town, London.

